

# EKO 2021

## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok  
jaroj, de post 2013  
2020: rekorda jaro:  
kun 60 komunikoj  
Subtene al la loka,  
landa, faka kaj  
regiona agado

EKO 2021-24 sendita el Budapeŝto la 20an de junio

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO persistas ĝis la jarfino

**AMO 74:** Gravega temo: 'Kiel aliri pli da junaj membroj tra Eŭropo'. La temo estos prezentita de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kiu montras, ke UEA komprenas la gravecon de la defio. Tiu prezento okazos tuj post la jam pretigita kaj distribuita enkonduko, pretigita de la AMO-teamo. Pliaj kontribuantoj aktive varbataj. Anoncu vin! La partopreno de TEJO aparte serĉata! La enkonduka prezento sendita kun EKO 20. La seminario okazos en la Virtuala Kongreso 2 de UEA en la 22a de julio (ĵaŭde).



**AMO 75:** Greziljono estas perfekta loko por trakti kulturon. Ni alkroĉas la enkondukon, kiun pretigis la AMO-teamo; ĝi kiu enhavas la nunan staton de la kompilata programo. Inter la prezentantoj: Francois Lo Jacomo, Renée Triolle kaj Ilona Koutny.

**AMO 76:** ILEI petis ŝanĝon al la unua temo. La nova temo estas: 'Edukado pri / al/ per Esperanto-Kulturo', kiu tre similas al la temo por AMO 75, kiu estos okazinta dekon da tagoj pli frue. La dua temo restas senŝanĝa: 'Efika instruado tra Afriko'. La Afrika Komisiono estas petita organizi kontribuantojn kaj eĉ kunordigi la programon. Okazos inter la 7a kaj 14a de aŭgusto kadre de VEKI 2 – la virtuala kongreso de ILEI.

**AMO 77:** septembro 11 (sabato). Programo estas formulota nur post ricevo de la rezultoj de AMO 74, kiu havas ege similan temon.

**AMO 78:** novembro 28 kun IKEF, tem-elekto estas aktive diskutata ene de IKEF.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Redaktoroj:  
Stefan MacGill kaj  
Mirejo Grosjean

**ENHAVO**

- AMO eterna
- Kolombo duas
- Kant' evoluas
- Amerika progreso
- Hispanaj kursoj
- Aktivaj junuloj

## Dua Kolombo disflugas – UEA komunikas brile

Aperis la dua numero de *La Kolombo de Paco*, la kuriero de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto. Legu, ĝuu, senpage elŝutu, libere kaj aktive diskonigu ĝin al viaj amikoj en Esperantujo! Ene de la kvar-paĝa enhavo estas alvoko de Duncan Charters por Societo Zamenhof, informoj pri la virtualaj kongresoj de TEJO kaj ILEI kaj SES-2021 (slovakia iniciato por bonvenigi homojn, kiuj finis retajn kursojn), la 8a Afrika Kongreso en Senegalo fine de 2022, la nordamerika somera kursaro NASK, RETOSO de TEJO kaj la ĉeesta kongreso en Israelo en oktobro 2021.

[https://revuoesperanto.org/kolombo\\_2](https://revuoesperanto.org/kolombo_2)



## La Eŭropa Festivalo de Eo-Kantoj reklamas sin

Ni alkroĉas la plejlastan afiŝon por tiu evento, kiu okazos en la 12a de septembro 2021, kun AMO 77 en la antaŭa tago (sabato). Kuraĝu anoncu vian kantgrupon kaj pretigu vian registraĵojn jam nun! La limdato por sendo estas la 15a de aŭgusto.

## Oni agegas kaj malaĝiĝas tra Latin-Ameriko!

La projekto <Landa Parad’> ege progresas tra 2021. Jam kreita estas nova regiono ‘Pacifiko’ kiu fine vidigas la landojn Aŭstralio, Nov-Zelando, Kanado, Meksiko kaj Usono. Ĝisdatigitaj estas la prezentoj por Ameriko (latina) kaj Eŭropo. Afriko nun estas en aktiva preparo, kun MONA kaj Azio sekvontaj poste en la jaro. Tio ĝisdatigos la tutan kolekton de 2020 ĝis 2021 – vidu en <aktivulo.net>.

Grava evoluo, kiun reliefigis la preparoj, estas la signifaj kreskoj en kelkaj landoj de Latinameriko, precipe inter junuloj. Tio dankeblas al la hispanlingva kurso anoncita en 2020 de UEA kaj TEJO kaj raportita en EKO 16, kaj ilia posta bonvenigo al la miaopinie brile sukcesa unua Virtuala Kongreso de UEA. La landoj kun signifaj kreskoj (AM+IM) inter 2019 kaj 2020: Domingo 10 → 24, Haitio 0 → 6, Kolombio 41 → 135, Peruo 32 → 51, Venezuelo 27 → 35. Tiuj kreskoj okazas ĉefe pro la faka kontribuo de Luis Obando el Kolombio.

Tiu kresko spegulas la laŭdindan kreskon inter junuloj en la Filipinoj (2 → 18). Tiu kresko rezultas el la laboro de Albert Stalin Garrido, la nuntempa estrarano de TEJO pri landa agado. Entute UEA devas esti pli preta rekoni pli vaste la valoran kontribuon de nove aperintaj junuloj kiel Albert kaj Luis (kaj TEJO-volontulo Valentin Ceretto Bergerat).

**Postskriboj:** unue, tiuj el vi (kiel mi), kiu ankoraŭ memoras, kio estas faksmaŝino (papermaĉilo), bonvolu sub ‘Usono’ forigi la faksan aliron al ‘Esperanto-USA’. Due, kiom ajn kreskas aliaj landoj, Brazilo restas la kontinenta eminentulo. Por vidi gvidon tra ilia BEL-oficejo en Braziljo, rigardu ĉe:

[https://www.youtube.com/watch?v=6tlnzPKnc\\_U](https://www.youtube.com/watch?v=6tlnzPKnc_U)

===== 650 vortoj =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.